



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 10-a de Novembro 2020

(zom-kunveno)

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel, Gabi Zeevi.

Gastoj: (partatempe) Ŝaj Mor (Israelo), A.Pacholski (Pollando).

Protokolo de la antaŭa kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.

1. Raportoj (Amri)

a) **Amri:** registraĵo de la klubvespero de ELI kun Margaret Zaleski-Zamenhof estis enretigita, kun ŝia konsento; ŝi multe dankis, pliaj eksterlandanoj interesiĝis.

b) Projekto “Nicocot” – Amri finis 3-lecionan Zom-kurson por la 10-a klaso en la mezlernejo “Ironi Alef” en Modiin. Partorenis 19 lernantoj, estis bonaj reagoj.

2. Israela Esperantisto n-ro 169 kaj 170

a) Mikaelo ne povis partopreni – li estas en Ukrainio.

b) Amri sondis ĉe la eksterlandaj abonantoj, ĉu ili volas plu ricevi la paperan IE – se jes, ili bonvolu pagi la jarabonon de 10 EUR. Alternative eblos reta abono, kiu kostos 5 EUR jare, kaj tiam oni ricevos la dosieron rette. Se oni ne respondos, ELI ne plu sendos la paperan bultenon.

c) Ĉu estu nur nigraj-blankaj fotoj interne, aŭ koloraj? **Amri:** la tutkolora presado duobligus la presprezon. La kialo por la nigra-blanka presado de IE169 estis, ke la fotoj estis malgrandaj kaj pluraj el ili – preskaŭ nigra-blankaj. La redakta kaj enpaĝiga stilo de Mikaelo diferencas de la mia, kiu enhavas pli da fotoj kaj pli grandajn. Se estos origine koloraj fotoj kaj ne tro malgrandaj, indas tamen printi la tuton kolore. Kompreneble, la reta versio estu kolora, la papera povas esti (interne) nigra-blanka. Kompromisa maniero estas printi nur kelkajn paĝojn (pres-kvaroblon) kolore kaj la ceteron nigrablanke. Mikaelo preparos du versiojn: por la presejo interne nigra-blankan, por la reta versio – tutkoloran.

ĉ) Mikaelo laboras nun pri n-ro 170, parto jam estas preta. Amri sendis du artikolojn: pri IVEK kaj pri la koronaviruso en Israelo.

3. Problemoj pri la Dratverejo (Jehoŝua)

a) Laŭ la raporto de Amos Ŝapira la luantoj apartiĝis. Marina Bajtman, la virino, forlasis la apartamenton kun la gefiloj al sia patrino. Dima Nemirovski, la viro, laŭdire, enhospitaliĝis, kaj volis renkontiĝi kun Amos en la hospitalo “Ithilov”. Sed – li ne aperis, kaj Amos eĉ ne sukcesis trovi lian registriĝon en la hospitalo. Ambaŭ ne respondas telefone. Kio okazos pri la ŝuldo?

b) Amos devos solvi la problemon: kien malaperis Dima el la hospitalo – se entute li estis enhospitaliĝinta. Jehoŝua provos ankaŭ enketi telefone.

c) Avraham, la dom-komitatano, plendis al ni pere de Amos, ke estas damaĝo en la najbara apartamento pro ni. Ni devos peti detalojn, inkluzive la taksatan sumon, kaj turni nin al la

2/...



asekur-kompanio, ni ja estas asekuritaj. Ili jam pagis iam – do, konscias sian parton pri la asekurado de la apartamento. Se nun ili ne emos kovri la elspezojn, ni devos ekprocesi ĉe la Juĝejo pri Malaltsumaj Procesoj (בית-משפט לתביעות קטנות) – ĝenerale tiuokaze la postuloj finiĝas per kompromiso.

4. La Registristo pri societoj (Ŝlomo)

La 20-an de oktobro venis letero de la Registristo: ĉar mankis mencio pri aprobo de la vorta raporto (apud la financa) en la protokolo de la Ĝenerala Kunveno, subskribita de du estraranoj, li postulas aprobi ĝin (post **tri monatoj!**). Ŝlomo ne sukcesis kontakti telefone kun iu ajn respondeculo tie; Jehoŝua ekprovos.

5. Zamenhofa Vespero – la 2020-12-15 (Jehoŝua)

a) Ĝi estos zom-kunveno. Programeroj estas bonvenataj. Matilda laciĝis kaj ŝia komputilo same – do, ni devos prizorgi ankaŭ la artan programon.

b) La kontrol-komisiono (Ŝaŭl Ĥasid) raportos. Jehoŝua raportos. Ne estos elektoj – ja lastfoje la Ĝenerala Kunveno decidis elekti la Estraron por du jaroj. Indas mencii tion antaŭe – ĉar kelkaj ne scias, aŭ ne memoras.

La venonta kunsido: la 8-an de Decembro, 2020, je la horo 20h00 (*zom-kunveno*)

Protokolis: Gabi Zeevi